

**Karlo Markso**

**Kritiko de la Gotaa programo**



**Karlo Markso**

**Kritiko de la  
Gotaa Programo**

**Tradukita de Vilhelmo Lutermano**

**Monda Asembleo Socia (MAS)**

Karlo Markso

Kritiko de la Gotaa Programo

Verkita de aprilo ĝis komence de majo 1875. Unuafoje publikigita en: „Die Neue Zeit”, n-ro 18, 1-a volumo, 1890 - 1891.

Tiu ĉi teksto sekvas la manuskripton de Markso. Enhavaj ŝanĝoj en la eldono de 1891 estas menciitaj en piednotoj. Teksteroj, kiuj estis 1891 ellasitaj kaj anstataŭigitaj per punktoj, estas metitaj en angulaj krampoj.

La Esperanta traduko sekvas, por la antaŭparolo de Frederiko Engelso, inkluzive de la piednotoj, la francan eldonon de

[http://www.marxists.org/francais/engels/works/1891/Critique du programme de Gotha](http://www.marxists.org/francais/engels/works/1891/Critique%20du%20programme%20de%20Gotha)

kun konsulto de la germana eldono de Karl Marx / Friedrich Engels: Werke, (Karl) Dietz Verlag, Berlino (GDR), vol. 22, 3-a eldono 1972, senŝanĝa represo de la 1-a eldono 1963, Berlino (GDR), p. 90, 91 laŭ la reta eldono:

[www.mlwerke.de/me/me22/me22\\_090.htm](http://www.mlwerke.de/me/me22/me22_090.htm)

por la letero al Bracke la germanan eldonon de

Karl Marx/Friedrich Engels: Werke, (Karl) Dietz Verlag, Berlino (GDR), vol. 19, 4-a eldono 1973, senŝanĝa represo de la 1-a eldono 1962, Berlino (GDR), p. 13-32.

laŭ la reta eldono:

[www.mlwerke.de/me/me19/me19\\_013.htm#Kap\\_I](http://www.mlwerke.de/me/me19/me19_013.htm#Kap_I)

kaj por la Kritiko de la Gotaa Programo de Markso:

Karl Marx/Friedrich Engels: Werke, (Karl) Dietz Verlag,

Berlino (GDR), vol. 19, 4-a eldono 1973, senŝanĝa reprezento de la 1-a eldono 1962, Berlino (GDR), p. 13-32.

laŭ la reta eldono:  
[www.mlwerke.de/me/me19/me19\\_013.htm#Kap\\_II](http://www.mlwerke.de/me/me19/me19_013.htm#Kap_II)



Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo  
kun antaŭparolo de Frederiko Engelso  
kaj la letero al Bracke  
tradukita de Vilhelmo Lutermano  
Monda Asembleo Socia (MAS),  
3-a eldono, 2014  
ISBN 978-2-918300-...-..



## Enhavo

|                                                                                                                                                                                                                                     |    |
|-------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|----|
| Frederiko Engelso: Antaŭparolo.....                                                                                                                                                                                                 | 12 |
| Letero al Wilhelm Bracke.....                                                                                                                                                                                                       | 14 |
| Marĝenglosoj al la programo de la germana<br>laboristpartio.....                                                                                                                                                                    | 17 |
| I.....                                                                                                                                                                                                                              | 17 |
| 1. „La laboro estas la fonto de ĉia riĉaĵo kaj<br>de ĉia kulturo, kaj ĉar utila laboro estas ebla<br>nur en la socio kaj per la socio, la produktaĵo<br>de la laboro apartenas komplete, laŭ sama<br>rajto, al ĉiuj socianoj.”..... | 17 |
| Unua parto de la paragrafo: „La laboro<br>estas la fonto de ĉia riĉaĵo kaj de ĉia<br>kulturo.”.....                                                                                                                                 | 17 |
| Dua parto de la paragrafo: „Utila laboro<br>estas ebla nur en la socio kaj per la socio.”<br>.....                                                                                                                                  | 18 |
| Trie: La konkludo: „Kaj ĉar utila laboro estas<br>ebla nur en la socio kaj per la socio – la<br>produktaĵo de la laboro apartenas<br>komplete, laŭ sama rajto, al ĉiuj socianoj.”<br>.....                                          | 19 |
| 2. „En la hodiaŭa socio la laborrimedoj estas<br>monopolo de la kapitalista klaso; la per tio<br>kondiĉita dependeco de la laborista klaso<br>estas la kaŭzo de la mizero kaj de la servuto<br>en ĉiaj formoj.”.....                | 21 |
| 3. „La liberigo de la laboro postulas la leviĝon                                                                                                                                                                                    |    |

|                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                  |    |
|--------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|----|
| de la laborrimedoj al komuna havaĵo de la socio kaj la kooperativan reguladon de la ĉiomlaboro kun justa divido de la laborproduktaĵo.” .....                                                                                                                                                                                                    | 22 |
| 4. „La liberigo de la laboro devas esti la tasko de la laborista klaso, fronte al kiu ĉiuj aliaj klasoj estas nur reakcia amaso.” .....                                                                                                                                                                                                          | 28 |
| 5. „La laborista klaso agas por sia liberigo unue en la kadro de la nuna nacia ŝtato, konscia, ke la necesa rezulto de sia strebado, kiu estas komuna al la laboristoj de ĉiuj kulturlandoj, estos la internacia popolfратиĝo.” .....                                                                                                            | 30 |
| II.....                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                          | 32 |
| „Elirante de tiuj principoj, la germana laboristpartio alstrebas per ĉiaj laŭleĝaj rimedoj la liberan ŝtaton – kaj – la socialisman socion; la nuligon de la salajrosistemo kun la fera salajroleĝo – kaj – de la ekspluatado en ĉia formo; la forigon de ĉia socia kaj politika malegaleco.” .....                                              | 32 |
| III.....                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                         | 35 |
| „La germana laboristpartio postulas, por prepari la vojon al la solvo de la sociala demando, la starigon de produktadkooperativoj kun ŝtata helpo sub la demokratia kontrolado de la laboranta popolo. La produktadkooperativoj estas por industrio kaj terkulturado naskendaj en sama amplekso, ke el ili estiĝu la socialisma organiziĝo de la |    |

|                                                                                                                 |    |
|-----------------------------------------------------------------------------------------------------------------|----|
| ĉiomlaboro.”.....                                                                                               | 35 |
| IV.....                                                                                                         | 37 |
| A. „Libereca bazo de la ŝtato.”.....                                                                            | 37 |
| B. „La germana laboristpartio postulas kiel in-<br>telektan kaj moralan bazon de la ŝtato:.....                 | 41 |
| 1. Ĝeneralan kaj saman popoledukadon per<br>la ŝtato. Ĝeneralan devigan lernejon,<br>senpagan instruadon.”..... | 41 |
| 2. Normalan labortagon.....                                                                                     | 43 |
| 3. Limigon de la laboro de virinoj kaj<br>malpermeson de la laboro de infanoj.....                              | 43 |
| 4. Ŝtatan prigardon de la fabrik-, metiej- kaj<br>hejm-industrio.”.....                                         | 44 |
| 5. Reguladon de la mallibereja laboro.....                                                                      | 44 |
| 6. Efikan malliberjan leĝon.....                                                                                | 44 |

## Frederiko Engelso: Antaŭparolo

La manuskripto ĉi tie presita – la letero al Bracke same kiel la programkritiko – estis adresita al Bracke en 1875, mallonge antaŭ la unuiĝa kongreso de Gotao<sup>1</sup>, por esti komunikita al Geib, Auer, Bebel kaj Liebknecht kaj poste resendota al Markso. Ĉar la kongreso de Halo<sup>2</sup> metis sur la tagordon de la partio la diskutadon pri la Gotaa programo, mi kredus kulpi prisilentadon se mi pli longe fortenus al la publiko tiun konsiderindan dokumenton, eble la plej konsiderindan inter tiuj kiuj koncernas tiun diskuton.<sup>3</sup>

Sed la manuskripto havas ankoraŭ alian atingopovon, kaj multe pli grandan. Por la unua fojo oni trovas ĉi tie, klare kaj solide argumentite, la poziciigon de Markso fronte al tendencoj enkondukitaj de Lasalo<sup>4</sup> ekde ties aliĝo al la movado, kaj koncerne samtempe la ekonomiajn kaj taktikajn principojn.

- 
- 1 Gotao [en la germana: *Gotha*], urbo en la germana federacia lando Turingio). -vl
  - 2 La socialdemokrata kongreso de Halo [germane: *Halle*] (1890), la unua kiu sekvis al la nuligo de la „leĝo kontraŭ la socialistoj” decidis, laŭ raporto de Vilhelmo Libknehto [germane: *Wilhelm Liebknecht*], elabori novan programon de la partio. Dum la sekva kongreso (Erfurto, 1891), la malnova programo (de Gotao) estis anstataŭigita de tiu de Erfurto.
  - 3 La 17-an de januaro 1891, Engelso skribas en letero al Sorge (gvidanto de la 1-a Internacio en Usono, en Novjorko); „*La n-ro 17 de la Neue Zeit* [la teoria revuo de la germana socialdemokrataro] lanĉos bombon: la kritikon de la programo de 1875, de Markso. Vi ĝojos, sed ĉe iuj en Germanio tio kaŭzos indignon kaj koleron.” La 11-an de februaro 1891 li denove skribas: „*Vi certe legis la artikolon de Markso en la Neue Zeit. Ĝi kaŭzis komence, ĉe la socialistaj gvidantoj en Germanio, koleron kiu nun tendencas mildiĝi; male, ene de la partio mem – escepte ĉe la malnovaj Lasalanoj – la ĝojo estas granda.*”
  - 4 Lasalo: Ferdinand Lassalle, germana politikisto, socialisto kaj verkisto, naskita la 11-an de aprilo 1825 en *Breslau* (nuntempa Vroclavo) kiel Ferdinand Lassal, mortis pro duelo la 31-an de aŭgusto 1864 en Carouge apud Ĝenevo. -vl

## Frederiko Engelso: Antaŭparolo

La senkompata severo per kiu la programprojekto estas analizita, la nefleksiĝemo kun kiu la akiritaj rezultoj estas eldiritaj kaj la malfortaj punktoj de la projekto nudigitaj, ĉio ĉi jam ne povas vundi hodiaŭ, post pli ol dek-kvin jaroj. Specifaj lasalanoj ekzistas jam nur eksterlande, solecaj ruinoj, kaj en Halo la programo de Gotao estis forlasita eĉ de siaj aŭtoroj, kiel absolute nesufiĉa.

Malgraŭ tio, mi fortranĉis, tie kie la afero estis indiferenta, kaj anstataŭigis per punktoj kelkajn esprimojn aŭ prijuĝojn akre personajn. Markso mem farintus tion, se li publikigus sian manuskripton hodiaŭ. La vigleco de la lingvaĵo, kiu renkontiĝas kelkfoje, klarigeblas per du cirkonstancoj. Unue ni estis, Markso kaj mi, en rilatoj kun la germana movado pli intime ol kun ĉiu alia; la evidenta malprogreso kiun atestis la programprojekto devis emocii nin tute aparte. Due, ni estis en tiu momento, apenaŭ du jarojn post la Haga kongreso de la Internacio<sup>5</sup>, en plena batalo kun Bakunin kaj liaj anarĥiistoj kiuj respondecigis nin pri ĉio kio okazis en Germanio en la laborista movado; ni devis do ankaŭ atendi ke oni atribuos al ni la nekonfesatan patrecon de la programo. Tiuj konsideroj estas hodiaŭ arĥaiĝintaj, kaj samtempe la ekzistokialo de tiuj teksteroj.

Ankaŭ pro presleĝaj kialoj kelkaj frazoj estas nur aluditaj per punktoj. Kie mi devis elekti pli mildan esprimon, tiu estas metita inter rektaj krampoj. Alie la represoj estas laŭvorta.

Londono, la 6-an de januaro 1891

Fr. Engelso

---

5 Dum tiu kongreso de Hago, Bakunin kaj liaj partizanoj estis ekskluditaj el la Internacio.

## Letero al Wilhelm Bracke

Londono, la 5-an de majo 1875

Kara Bracke!

Sekvajn kritikajn marĝenglosojn al la koaliciprogramo mi petas vin, post tralego, komuniki por enigardo al Geib kaj Auer, Bebel kaj Liebknecht. Mi estis superokupata kaj devas jam multe transiri la labormezuron kiu estas al mi kuraciste preskribita. Pro tio tute ne estis „ĝuo” por mi skribi tiom longan paperon. Sed tio necesis, por ke poste miaflanke farendaj paŝoj ne estu misinterpretotaj de la partiamikoj, por kiuj tiu ĉi mesaĝo estas destinita.

<Nome, post okazinta koalickongreso Engelso kaj mi publikigos mallongan deklaron, kun la enhavo ke ni estas tute distancaj de tiu principprogramo kaj havas nenion komunan kun ĝi.>

Tio nepras, ĉar eksterlande oni havas la opinion – tute eraran opinion – kiu estas zorge subtenata de malamikoj de la partio, ke ni de ĉi tie gvidas kaŝe la movadon de la t.n. partio de Ejzenaĥ<sup>6</sup>. Ankoraŭ en la laste aperinta rusa verko<sup>7</sup> Bakunin respondecigas min pri ekz-e ĉiuj programoj ktp de tiu partio <, eĉ pri ĉiu paŝo, kiun Libkneĥto faris ekde la tago de lia kunlaborado kun la popolpartio>.

Sendepende de tio estas mia devo, ne agnoski per diplomatia silentado programon kiu estas, laŭ mia konvinko, tute mallaŭdinda kaj demoralizanta la partion.

Ĉiu paŝo de reala moviĝo estas pli grava ol deko da programoj. Se oni do ne povis – kaj la tempaj cirkonstancoj

---

6 Originale: Eisenach [Ajzenaĥ], urbo en la germana lando Turingio, kie okazis la kongreso de tiu partio. -vl

7 Temas pri la libro de Bakunin *Staat und Anarchie* (Ŝtato kaj anarĥio), Zuriko, 1873. [Franca eld.]

ne permesis tion – iri *trans* la ejzenaĥa programo, tiam oni devintus simple fari interkonsenton pri agadoj kontraŭ la komuna malamiko. Sed se oni faras principprogramojn (anstataŭ prokrasti tiujn ĝis la tempo en kiu io tia estis preparita per pli longa komuna agado), tiam oni starigas antaŭ la tuta mondo markŝtonojn ĉe kiuj ĝi mezuras la nivelon de la partimovado.

La ĉefoj de la Lasalanoj venis, ĉar la kondiĉoj devigis ilin al tio. Se oni de komence klarigintus al ili, ke oni neniakaze komercaĉus per principoj, tiam ili *devintus* konteniĝi per agadprogramo aŭ organiza plano por komuna agado. Anstataŭ tio oni permesas al ili veni armite per mandatoj, kaj siaflanke agnoskas tiujn mandatojn devigaj, do oni kapitulacas senkondiĉe antaŭ la helpbezonulo. Por meti la pinton sur la aferon, ili faras ree kongreson *antaŭ* la *kompromis-kongreso*, dum la propra partio okazigas sian kongreson *post festum*<sup>8</sup>. Oni scias kiom la nura fakto de unuiĝo kontentigas la laboristojn, sed oni eraras se oni kredas ke tiu momenta sukceso ne estas aĉetita tro multekoste. Cetere la programo tute ne taŭgas, eĉ sen konsidero al la lasalecaj kredartikoloj.

<Mi sendos al vi venonte la finliveraĵon de la franca eldono de la Kapitalo<sup>9</sup>. La daŭrigo de la presado estis malhelpita por pli longa tempo pro la malpermeso de la franca registaro. Ĉi-semajne aŭ komence de la venonta la afero finiĝos. Ĉu vi ricevis la antaŭajn 6 liveraĵojn? Bonvole skribu al mi ankaŭ la *adreson* de Bernhard Becker, al kiu mi devas ankaŭ sendi la finliveraĵojn.>

---

8 [Latine:] Post la festo. Efektive, la lasalana kongreso okazis antaŭ tiu de Gotao en majo; kaj la kongreso de la ejzenaĥanoj en Hamburgo la 8-an de junio. [Franca eld.]

9 La unua franca traduko de la unua volumo de la *Kapitalo* aperis, sub prigardo de Markso mem, per kajeroj en Parizo inter 1872 kaj 1875. [Franca eld.]

## Letero al Wilhelm Bracke

La „Volksstaat“-librejo<sup>10</sup> havas apartajn manierojn. Tiel oni venigis al mi ĝis tiu ĉi momento ekz-e eĉ ne unu solan ekzempleron de la preskopio de la „Kolonja komunistproceso“<sup>11</sup>.

Kun amika saluto<sup>12</sup>

Via Karlo Markso

---

10 Centra organo de la ejzenaĥanoj de 1870 ĝis 1876. Ĝi aperis semajne en Lepsiko. Vilhelmo Libkneĥto estis la ĉefredaktisto. [Franca eld.]

11 La volumeto de Markso pri la proceso de la komunistoj de Kolonjo (juĝita en 1852) aperis komence de 1875. [Franca eld.]

12 Originale: Mit bestem Gruß (kutima formulo, laŭvorte: Kun plej bona saluto) -vl

# Margenglosoj al la programo de la germana laboristpartio

## I

1. „La laboro estas la fonto de ĉia riĉaĵo kaj de ĉia kulturo, kaj ĉar utila<sup>13</sup> laboro estas ebla nur en la socio kaj per la socio, la produktado de la laboro apartenas komplete<sup>14</sup>, laŭ sama rajto, al ĉiuj socianoj.”

***Unua parto de la paragrafo: „La laboro estas la fonto de ĉia riĉaĵo kaj de ĉia kulturo.”***

La laboro *ne estas la fonto* de ĉia riĉaĵo.<sup>15</sup> La *natur* estas same la fonto de la uzvaloroj (kaj el tiuj ja konsistas la konkreta riĉaĵo!) kiel la laboro, kiu mem estas nur la esprimiĝo de naturforto, de la homa laborforto. Tiu kliŝo troviĝas en ĉiuj infanlibroj kaj ĝustas se oni *subkondiĉas* ke la laboro okazas per la necesaj objektoj kaj rimedoj. Sed socialisma programo devas ne permesi al tiaj burĝaj diroj prisilenti la *kondiĉojn* kiuj sole donas sencon al ili. Nur en tio ke la homo rilatas dekomence kiel proprietulo de la naturo, de la unua fonto de ĉiuj labor-rimedoj kaj -objektoj, traktas ilin kiel apartenantajn al li, lia laboro fariĝas fonto de uzvaloroj, do ankaŭ de riĉaĵo. La burĝoj havas bonajn

---

13 Originale: *nutzbringend* (laŭvorte: utilporta, kutima esprimo kaj ĝenerale sinonimo de „nützlich”, utila) -vl

14 Originale: *unverkürzt* (laŭvorte: nemallongigite, netranĉite) -vl

15 Markso: La kapitalo, vol. 1: „La laboro estas do ne la sola fonto de la uzvaloroj kiujn ĝi produktas, de la materia riĉaĵo. Ĝi estas ties patro, kaj la tero, la patrino, kiel diras William Petty (Fama angla ekonomikisto kaj statistikisto – NdFE).” [Franca eld.]

Marĝenglosoj al la programo de la germana laboristpartio

kialojn imputi al la laboro *supernaturan kreivon*; ĉar ĝuste el la naturkondiĉeco de la laboro sekvas ke la homo, kiu posedas nenian alian proprieton ol sian laborforton, devas en ĉiuj sociaj kaj kulturaj kondiĉoj esti la sklavo de aliaj homoj, kiuj fariĝis proprietuloj de la konkretaj laborkondiĉoj. Nur kun ilia permeso li povas labori, do nur kun ilia permeso vivi.

Ni lasu nun la frazon tia kia ĝi estas aŭ pli ĝuste lamas. Kion oni atendus kiel konkludon? Evidente jenon:

*„Ĉar la laboro estas fonto de ĉia riĉaĵo, ankaŭ en la socio neniu povas alproprigi al si riĉaĵon krom kiel produkton de la laboro. Se li do ne mem laboras, li vivas de fremda laboro kaj alproprigas al si ankaŭ sian kulturon je la kostoj de fremda laboro.”*

Anstataŭ tio oni algluas per la vortŝraŭbo „kaj ĉar” duan frazon, por tiri konkludon el tiu, ne el la unua.

***Dua parto de la paragrafo: „Utila laboro estas ebla nur en la socio kaj per la socio.”***

Post la unua frazo la laboro estis la fonto de ĉia riĉaĵo kaj de ĉia kulturo, do ankaŭ nenia socio eblis sen laboro. Nun ni ekscias inverse, ke nenia „utila” laboro eblas sen socio.

Oni povintus diri same bone, ke nur en la socio senutila kaj eĉ ĝenerale malutila laboro povas fariĝi metio, ke nur en la socio oni povas vivi per nenifarado ktp ktp – mallonge, kopii la tutan Rusoon<sup>16</sup>.

---

16 Rusoo (Jean-Jacques Rousseau, 1712-1778): Franca filozofo de la „kleriga jarcento”. Reprezentanto de la maldekstra parto de la burĝaro (la tria stato), de la supreniranta burĝa demokratio, li estis elokventa advokato de la batalo kontraŭ la feŭda ekspluatado kaj la absolutismo kaj defendis la teorion de la „popola suvereneco” kiu realiĝis en la pleba revolucia batalo de la jakobenoj. Rusoo baze sian kritikon de la feŭda sistemo sur la

Kaj kio estas „utila” laboro? Ja nur la laboro kiu produktas la celatan utilefikon. Sovaĝulo – kaj la homo estas sovaĝulo post ĉesi esti simio – kiu ĉasmortigas beston per ŝtono, kiu kolektas fruktojn ktp, plenumas „utilan” laboron.

***Trie: La konkludo: „Kaj ĉar utila laboro estas ebla nur en la socio kaj per la socio – la produktaĵo de la laboro apartenas komplete, laŭ sama rajto, al ĉiuj socianoj.”***

Bela konkludo! Se la utila laboro eblas nur en la socio kaj per la socio, la laborproduktaĵo apartenas al la socio – kaj de ĝi devas veni al la individua laboristo nur tiom kiom ne necesas por konservi la „kondiĉon” de la laboro, la socion.

Efektive tiu frazo estis ankaŭ alvokita en ĉiuj tempoj *de la defendantoj de la ĉiufoja socistato*. Unue venas la rajtoj de la registaro kun ĉio kio gluas al tio, ĉar ĝi estas la socia organo por konservado de la socia ordo; poste venas la rajtoj de la diversaj specoj de privatproprietuloj, ĉar la diversaj specoj de privata proprieto estas la fundamentoj de la socio ktp. Oni vidas, ke oni povas laŭplaĉe uzi kaj tordi tiajn senenhavajn parolturnojn.

La unua kaj dua partoj de la paragrafo havas ian saĝan kuntekston nur en tia formo:

*„Fonto de la riĉaĵo kaj de la kulturo fariĝas la laboro nur kiel socia laboro”* aŭ, kio estas la samo, *„en kaj per la socio”*. Tiu frazo estas senkonteste ĝusta, ĉar se la izolita laboro (se ekzistas la materiaj kondiĉoj) ja povas krei uzvalorojn, ĝi povas krei nek riĉecon nek kulturon.

Sed same senkontesta estas la alia frazo:

---

abstrakta kaj neniel historia koncepto de natura egaleco, de la feliĉa kondiĉo de la homo en la prakomunismo kaj de la super-eco de la naturo kaj de la naturaj rilatojn super tiuj de la socio.  
[Franca eld.]

Marĝenglosoj al la programo de la germana laboristpartio

*„Laŭ la mezuro en kiu la laboro evoluas socie kaj per tio fariĝas fonto de riĉeco kaj kulturo, evoluas malriĉeco kaj mizero<sup>17</sup> flanke de la nelaboristo.”*

Tiu estas la leĝo de la ĝisnuna historio. Necesis do, anstataŭ fari ĝeneralajn frazaĵojn pri „la laboro” kaj „la socio”, ĉi tie klare pruvi kiel en la nuna kapitalisma socio fine kreiĝis la materialaj ktp kondiĉoj kiuj kapabligas kaj devigas la laboristojn rompi tiun historian malbenon.

Sed fakte la tuta, stile kaj enhave misa paragrafo ekzistas nur por skribi la ŝlosilvorton de Lasalo pri la „kompleta laborproduktaĵo” kiel sloganon sur la pinton de la partiflago. Poste mi revenos al la „laborproduktaĵo”, „la sama rajto” ktp, ĉar la sama afero revenas en alia formo.

## **2. „En la hodiaŭa socio la laborrimedoj estas monopollo de la kapitalista klaso; la per tio kondiĉita dependeco de la laborista klaso estas la kaŭzo de la mizero kaj de la servuto en ĉiaj formoj.”**

La frazo pruntita el la internacia statuto estas en tiu „plibonigita” eldono malĝusta.

En la hodiaŭa socio la laborrimedoj estas monopollo de la grundproprietuloj (la monopollo de la grundproprietulo estas eĉ bazo de la kapitalmonopolo) kaj de la kapitalistoj. La internacia statuto en la koncerna tekstero<sup>18</sup> nomas nek unu nek la alian klason de monopolistoj. Ĝi parolas pri la „*monopolo de la laborrimedoj, t.e. de la vivfontoj*”; la aldonaĵo

---

17 En la originalo: Verwahrlosung (malzorgo pri ordo kaj pureco).  
-vl

18 La koncerna tekstero troviĝas en la fama antaŭparto (redaktita de Markso en 1864) de la statuto de la Unua Internacio: „[Konsiderante] ke la ekonomia submetado de la laboristoj al la posedantoj de la laborrimedoj, do de la vivfontoj, estas la unua kaŭzo de la servuteco en ĉiaj formoj: socia mizero, intelekta brutaliĝo kaj politika dependeco ...” [Franca eld.]

„vivfontoj” montras sufiĉe ke la tergrundo estas inkludita en la laborrimedoj.

La plibonigo estis farita, ĉar Lasalo, pro nun ĝenerale konataj kialoj, atakis *nur* la kapitalistan klason, ne la grund-proprietulojn.<sup>19</sup> En Anglio la kapitalisto estas plej ofte eĉ ne posedanto de la tereno sur kiu staras lia fabriko.

### **3. „La liberigo de la laboro postulas la leviĝon de la laborrimedoj al komuna havaĵo de la socio kaj la kooperativan reguladon de la ĉiomlaboro kun justa divido de la laborproduktaĵo.”**

Kio estas „laborproduktaĵo”? Ĉu la produkto de la laboro aŭ ĝia valoro? Kaj ĉu en la lasta kazo, la ĉiomvaloro de la produkto aŭ nur la valorparto kiun la laboro aldonis al la valoro de la konsumitaj produktadrimedoj?

„Laborproduktaĵo” estas malklara ideo, per kiu Lasalo anstataŭigis certajn ekonomiajn nociojn.

Kio estas „justa” divido?

Ĉu la burĝoj ne asertas ke la nuntempa divido estas „justa”? Kaj ĉu ĝi ne estas efektive la sola „justa” divido surbaze de la hodiaŭa produktadmaniero? Ĉu la ekonomiaj kondiĉoj estas reguligataj per juraj nocioj, aŭ ĉu ne inverse la juraj kondiĉoj fontas el la ekonomiaj? Ĉu ne ankaŭ la socialistaj sektuloj havas la plej diversajn ideojn pri „justa” divido?

Por scii kiel ĉe tiu okazo kompreni la senenhavan esprimon „justa divido”, ni devas kunteni la unuan frazon kun tiu ĉi. La lasta celas socion en kiu „la laborrimedoj estas komuna havaĵo kaj la ĉiomlaboro estas reguligata kooperative”,

---

19 Lasalo [Lassalle] estis farinta interkonsenton kun Bismarko, la politika reprezentanto de la grandaj terproprietuloj. Vd la leteron de Markso al Kugelman pri la temo. [Franca eld.]

kaj el la unua paragrafo ni vidas ke „la produktaĵo de la laboro apartenas komplete, laŭ sama rajto, al ĉiuj socianoj”. Ĉu „al ĉiuj socianoj”? Ĉu ankaŭ al la nelaborantoj? Kie restas tiam „la komplete laborproduktaĵo”? Ĉu nur al la laborantaj socianoj? Kie restas tiam „la sama rajto” de ĉiuj socianoj?

Sed „ĉiuj socianoj” kaj „la sama rajto” estas evidente nur parolturnoj. La kerno konsistas en tio ke en tiu komunisma socio ĉiu laboristo devas ricevi sian „kompletan laborproduktaĵon” laŭ Lasalo.

Se ni komprenas unue la vorton „laborproduktaĵo” en la senco de la produkto de la laboro, tiam la kooperativa laborproduktaĵo estas *la socia ĉiomprodukto*.

De tiu estas nun deprenenda:

*Unue:* Kovraĵo por anstataŭigo de la konsumitaj *produkt-adrimedoj*.

*Due:* kroma parto por etendado de la produktado.

*Trie:* Rezerva kaj asekura fondusoj kontraŭ misaĵoj, perturboj per naturfenomenoj ktp.

Tiuj deprenoj de la „kompleta laborproduktaĵo” estas ekonomia nepreco, kaj ilia granda determinendas laŭ ekzistantaj rimedoj kaj fortoj, parte per probableckalkulo, sed ili estas neniel kalkuleblaj el la justeco.

Restas la alia parto de la ĉiomprodukto, destinita servi kiel konsumrimedoj. Antaŭ ol okazas la individua divido, de ĝi ree depreniĝas:

*Unue:* la ĝenerala, ne rekte al produktado apartenantaj *administraj kostoj*.

Tiu parto estas dekomence plej grave limigota kompare kun la nuna socio kaj malpliigās en la sama mezuro laŭ kiu la socio disvolviĝas.

*Due: kio estas destinita por komuna kontentigo de bezonoj, kiel lernejoj, saninstitucioj ktp.*

Tiu parto grave kreskas dekomence, kompare kun la nuna socio kaj kreskas en la sama mezuro laŭ kiu la nova socio disvolviĝas.

*Trie: Fondusoj por labornekapabluloj ktp, mallonge, por tio kio apartenas hodiaŭ al la oficiala malriĉulprizorgado.*

Nur nun ni venas al la „divido” kiun la programo, sub influo de Lasalo, mensbarite konsideras sola, nome la parton de konsumrimedoj kiu estas dividata inter la individuaj produktantoj de la socio.

La „kompleta laborproduktaĵo” intertempe transformiĝis al la „nekompleta”, kvankam tio, kio eskapas al la produktanto en lia eco de privatindivido, rekte aŭ malrekte utilas al li en lia eco de socio.

Kiel malaperis la senenhava parolturno de la „kompleta laborproduktaĵo”, tiel malaperas nun tute la senenhava parolturno de la „produktaĵo”.

Ene de la kooperativa, sur komuna havaĵo de la produktadrimedoj bazita socio la produktantoj ne interŝanĝas siajn produktojn; ĉi tie ankaŭ ne aperas la laboro aplikita al la produktoj kiel *valoro* de tiuj produktoj, kiel de ili posedata eco, ĉar nun, kontraste al la kapitalisma socio, la individuaj laboroj ekzistas jam ne per ĉirkaŭvojo, sed rekte kiel konsistaĵoj de la ĉiomlaboro. La vorto „laborproduktaĵo”, ankaŭ hodiaŭ evitinda pro ĝia dusenceco, tiel perdas ĉian sencon.

Temas ĉi tie pri komunisma socio, ne kia ĝi *disvolviĝis* sur sia propra bazo, sed inverse, kia ĝi *eliras* el la kapitalisma socio, do ĉiurilate, ekonomie, morale, spirite, estas ankoraŭ makulita per la denaskaj makuloj de la malnova socio, el kies utero ĝi venas. Laŭ tio, la individua produktanto – post la deprenoj – ricevas precize tion kion li donas

al ĝi. Kion li donis al ĝi, estas lia individua laborkvanto. Ekz-e la socia labortago konsistas el la sumo de la individuaj laborhoroj. La individua labortempo de la unuopa produktanto estas la parto de la socia labortago kiun li liveris, lia parto de ĝi. Li ricevas de la socio slipon, ke li liveris tiom da laboro (post depreno de lia laboro por la komunaj fondusoj), kaj per tiu slipo eltiras el la socia provizo de konsumrimedoj tiom kiom same multa laboro kostas. La saman kvanton da laboro, kiun li donis al la socio en unu formo, li rericevas en la alia.<sup>20</sup>

Tie regas evidente la sama principo kiu reguligas la varinterŝanĝon, laŭ la mezuro en kiu ĝi estas interŝanĝo de samaj valoroj. Enhavo kaj formo estas ŝanĝitaj, ĉar en la ŝanĝiĝintaj cirkonstancoj neniu povas doni ion krom sian laboron kaj ĉar aliflanke nenio povas eniri en la proprieton de individuoj krom individuaj konsumrimedoj. Sed koncerne ties dividon inter la individuaj produktantoj, regas la sama principo kiel ĉe la interŝanĝo de varekvivalentoj, same multa laboro interŝanĝiĝas en unu formo kontraŭ same multa laboro en la alia.

La sama rajto estas ĉi tie daŭre – laŭ la principo – la burĝa juro<sup>21</sup>, kvankam principo kaj praktiko jam ne kverelas

---

20 Markso jam donis al ni la bildon pri komunisma socio en kiu „la labortempo ludas duoblan rolon”: „Unuflanke, ĝia distribuiĝo en la socio reguligas la precizan rilaton de la diversaj funkcioj kun la diversaj bezonoj; aliflanke ĝi mezuras la individuan parton de ĉiu produktanto en la komuna laboro kaj samtempe la porcion kiun li rajtas ricevi el la komuna produktaĵo rezervita al konsumado.” (La kapitalo, vol. 1, p. 90). [Franca eld.] – En Esperanto vd Karlo Markso: La kapitalo, Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio, Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj unua ĝis naŭa, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, ISBN 978-2-918300-13-7, p. 95 kaj 96. -vl

21 En la germana, la nocioj *rajto* kaj *juro* esprimiĝas per la sama termino, *Recht*. -vl

inter si, dum la interŝanĝo de ekvivalentoj ĉe la varinterŝanĝo ekzistas nur *mezume*, ne en la individua kazo.

Malgraŭ tiu progreso, tiu *sama rajto* estas daŭre makulita per burĝa baro. La rajto de la produktantoj estas *proporcio* al iliaj laborliveradoj; la sameco konsistas en tio ke oni mezuras ĉe la *sama skalo*, la laboro. Sed iu estas korpe aŭ mense supera al la alia, liveras do en la sama tempo pli da laboro aŭ povas labori dum pli da tempo; kaj la laboro, por servi kiel mezuro, difinendas laŭ etendo aŭ intenso, alie ĝi ĉesas esti mezuro. Tiu *sama rajto* estas malsama rajto por malsama laboro. Ĝi ne agnoskas klasajn diferencojn, ĉar ĉiu laboristo estas nun kiel ĉiu alia; sed ĝi agnoskas silente la malsaman individuan talenton kaj pro tio produktkapablon de la laboristoj kiel naturajn privilegiojn. *Ĝi estas do rajto de la malsameco, laŭ sia enhavo, kiel ĉia rajto.* La rajto povas laŭ sia naturo ekzisti nur per aplikado de la sama skalo; sed la malsamaj individuoj (kaj ili ne estus diversaj individuoj se ili ne estus malsamaj) mezureblas nur je sama skalo, kondiĉe ke oni konsideras ilin laŭ unu sama vidpunkto, kaptas ilin nur de unu *difinita* flanko, ekz-e en la donita kazo konsideras ilin *nur kiel laboristojn* kaj vidas nenion alian en ili, senkonsidere de ĉio alia. Krome: Iu laboristo estas edzo, la alia ne; iu havas pli da infanoj ol la alia ktp ktp. Ĉe sama laborliverado kaj pro tio sama parto je la socia konsumfonduso do la unua ricevas fakte pli ol la alia, iu estas pli riĉa ol la alia ktp. Por eviti ĉiujn ĉi misojn, la rajto devus esti, anstataŭ sama, pli ĝuste malsama.

Sed tiuj misoj estas neeviteblaj en la unua fazo de la komunisma socio, kia ĝi ĵus eliris el la kapitalisma socio post longaj naskokonvulsioj. La rajto povas esti neniam pli alta ol la ekonomia konstruaĵo kaj la de ĝi kondiĉita kultur-evoluo de la socio.

En pli alta fazo de la komunisma socio, post kiam la sklaviga subordigado de la individuoj sub la labordividon, per

tio ankaŭ la kontraŭdiro de spirita kaj korpa laboro malaperis; post kiam la laboro fariĝis ne nur rimedo por vivado, sed mem la unua vivbezono; post kiam kun la ĉiufanka disvolviĝo de la individuoj kreskis ankaŭ iliaj produktfortoj kaj ĉiuj fontoj de la kooperativa riĉeco fluas pli plene – nur tiam la mallarĝa burĝa jurhorizonto plene transpaŝeblas kaj la socio povas skribi sur sian standardon: Ĉiu laŭ siaj kapabloj, al ĉiu laŭ liaj bezonoj!

Mi pritraktis pli detale la „kompletan laborproduktaĵon” unuflanke, „la saman rajton”, „la justan dividon” aliflanke, por montri kiom oni fuŝas, se oni unuflanke volas retrudi al nia partio ideojn, kiuj havis sencon en certa tempo, sed kiuj fariĝis nun senvaloraj arĥaikaĵoj, kaj aliflanke tordas la realismon komprenon, kiu kun tiom da peno instruiĝis al la partio – kaj kiu enradikiĝis en ĝi –, per ideologiaj juraj kaj aliaj stultaj babilaĵoj kutimaj ĉe la demokratoj kaj francaj socialistoj.

Sendepende de la ĝis nun dirito estis entute erare emfazi la t.n. *dividon* kaj meti sur ĝin la ĉefan akcenton.

La ĉiufoja divido de la konsumrimedoj estas nur la sekvo de la divido de la produktadkondiĉoj mem. La kapitalisma produktadmaniero ekz-e baziĝas sur tio ke la konkretaj produktadkondiĉoj estas donitaj al nelaboristoj en formo de kapitalproprietulo kaj grundproprietulo, dum la amaso estas nur proprietulo de sia persona produktadkondiĉo, la laborforto. Se la elemento de la produktado estas tiel dividita, rezultiĝas per si mem la hodiaŭa divido de la konsumrimedoj. Se la konkretaj produktadkondiĉoj estas kooperativa proprietulo de la laboristoj mem, tiam rezultiĝas, same, divido de la konsumrimedo malsama ol la hodiaŭa. La vulgar-socialismo (kaj de ĝi parto de la demokratio) transprenis de la burĝaj ekonomikistoj la principon konsideri kaj pritrakti la distribuadon kiel sendependan de la produktadmaniero, pro tio prezenti la socialismon ĉefe kiel temon de distribuado.

Post kiam la vera rilato estis klarigita, kial do retropaŝi?

#### **4. „La liberigo de la laboro devas esti la tasko de la laborista klaso, fronte al kiu ĉiuj aliaj klasoj estas nur reakcia amaso.”**

La unua strofo estas el la enkondukaj vortoj de la internaciaj statutoj, sed „plibonigita”. Tie tekstas: „La liberigo de la laborista klaso devas esti la ago de la laboristoj mem”; sed ĉi tie „la laborista klaso” devas liberigi – kion? „la laboron”. Komprenu tion kiu povas.

Kompense, la kontraŭstrofo estas plej pura citaĵo de Lasalo: „fronte al (la laborista klaso) ĉiuj aliaj klasoj konsistigas *nur reakcian amason*”.

En la *Komunista Manifesto*<sup>22</sup> tekstas: „*El ĉiuj klasoj, kiuj nuntempe kontraŭstaras al la burĝaro, nur la proletaro estas vere revolucia klaso. La ceteraj klasoj kadukiĝas kaj pereas kun la granda industrio, la proletaro estas ties plej propra produkto.*”

La burĝaro estas ĉi tie komprenata kiel revolucia klaso – kiel portanto de la granda industrio – fronte al feŭduloj kaj mezaj klasoj, kiuj volas konservi ĉiujn sociajn poziciojn kiuj estas la konstruaĵo de malnoviĝintaj produktadmanieroj. Ili do ne konsistigas *kune kun la burĝaro* nur reakcian amason.

Aliflanke la proletaro estas revolucia fronte al la burĝaro, ĉar ĝi, mem elkreskinta sur la grundo de la granda industrio, strebas demeti al la produktado la kapitalisman karakteron, kiun la burĝaro provas eternigi. Sed la *Manifesto* aldonas: ke la „mezaj klasoj ... (fariĝas) revoluciaj ... konsidere sian ontan transiron al la proletaro”.

---

22 Karl Marx kaj Friedrich Engels: Manifesto de la Komunista Partio, tradukita de Detlev Blanke, Progreso, Moskvo, 1991.

Marĝenglosoj al la programo de la germana laboristpartio

El tiu vidpunkto do estas sensencaĵo, ke ili „kune kun la burĝaro” kaj krome kun la feŭduloj, fronte al la laborista klaso „konsistigas nur reakcian amason”.

Ĉu oni ĉe la lastaj elektoj kriis al la metiistoj, etindustriistoj ktp kaj al la *terkulturistoj*: Fronte al ni vi konsistigas kun la burĝoj kaj feŭduloj nur reakcian amason?

Lasalo sciis la „Komunistan Manifeston” parkere kiel liaj kredantoj la sanktajn skribojn kiujn li verkis. Se li do tiel maldelikate falsis, tio okazis nur por plibeligi sian aliancon kun la absolutismaj kaj feŭdaj kontraŭuloj kontraŭ la burĝaro.

En la supra paragrafo lia maksimumo estas altirita ĉe la haroj, sen ajna kunteksto kun la fuŝita citaĵo el la statuto de la Internacio. Temas do ĉi tie simple pri impertinento, tia kiu tute ne malplaĉas al s-ro Bismarko, sed pri iu el tiaj banalaj krudaĵoj kutimaj al la berlina Marato<sup>23</sup>.

**5. „La laborista klaso agas por sia liberigo unue en la kadro de la nuna nacia ŝtato, konscia, ke la neceso rezulto de sia strebado, kiu estas komuna al la laboristoj de ĉiuj kulturlandoj, estos la internacia popolfратиĝo.”**

Lasalo konceptis, kontraste al la „Komunista Manifesto” kaj al ĉia antaŭa socialismo, la laboristan movadon el la plej malvaste nacia vidpunkto. Oni sekvas lin en tio – kaj tio post la agado de la Internacio!

Kompreniĝas tute per si mem, ke, por entute povi batali, la laborista klaso devas unue organiziĝi kiel klaso hejme ĉe si, kaj ke la enlando estas la rekta scenejo de ĝia batalo. En tio ĝia klasbatalo estas nacia ne laŭ la enhavo, sed, kiel

---

23 Markso nomas per tiu ironia nomo [Marat] s-ron Hasselmann, la ĉefredaktiston de la *Neuer Sozial-Demokrat*, centra organo de la Lasalanoj. [Franca eld.]

diras la „Komunista Manifesto”, „laŭ la formo”. Sed la „kadro de la hodiaŭa nacia ŝtato”, ekz-e de la Germana Regno, staras siavice mem ekonomie „en la kadro de la mondmerkato”, politike „en la kadro de la sistemo de la ŝtatoj”. La unue pasanta komercisto scias, ke la germana komerco estas samtempe eksterlanda komerco, kaj la grandeco de s-ro Bismarko konsistas ja ĝuste en lia maniero de *internacia* politiko.

Kaj al kio la germana laborista partio reduktas la internaciismon? Al la konscio, ke la rezulto de ĝia strebado „estos la *internacia popolfратиĝo*” – banalaĵo pruntita el la burĝa Ligo de Libereco kaj Paco<sup>24</sup>, kiel ekvivalento por la internacia fratiĝo de la laboristaj klasoj en komuna batalo kontraŭ la regantaj klasoj kaj ties registaroj. Do, pri *internaciaj funkcioj* de la germana laborista klaso neniam vorto! Kaj tiel ĝi devas alfronti la propran burĝaron kiu jam fratiĝis kontraŭ ĝi kun la burĝoj de ĉiuj aliaj landoj, kaj la internacian komplotpolitikon de sinjoro Bismarko!

Fakte la internacia kredkonfeso de la programo staras ankoraŭ *senfine profunde* sub tiu de la liberkomerca partio. Ankaŭ ĝi asertas ke la rezulto de ĝia strebado estas „la internacia popolfратиĝo”. Sed ĝi faras ion por internaciigi la komercon, kaj tute ne kontentiĝas per la konscio – ke ĉiuj popoloj komercas ĉe si hejme.

La internacia agado de la laboristaj klasoj neniel dependas de la ekzisto de la „*Internacia Laborist-Asocio*”. Tiu estis nur la unua provo krei por tiu agado centran organon; provo, kiu, pro la impulso kiun ĝi donis, akiris daŭran sukceson, sed kiu en *sia unua historia formo* post la falo de la Pariza Komunumo ne estis pli longe realigebla.

---

24 La Internacia Ligo por Paco kaj Libereco, fondita en Ĝenevo en 1867, estis internacia organizaĵo de burĝaj demokratoj kaj de pacistoj partizanoj de liberkomerco, kontraŭ kiu Markso kaj la 1-a Internacio decideme batalis. [Franca eld.]

Marĝenglosoj al la programo de la germana laboristpartio

La „*Norddeutsche*”<sup>25</sup> de Bismarko tute pravis kiam ĝi je kontentigo de sia mastro anoncis ke la germana laboristpartio en la nova programo ĵure malagnoskis la internaciismon.

## II

**„Elirante de tiuj principoj, la germana laboristpartio alstrebas per ĉiaj laŭleĝaj rimedoj la liberan ŝtaton – kaj – la socialisman socion; la nuligon de la salajrosistemo kun la fera salajroleĝo – kaj – de la ekspluatado en ĉia formo; la forigon de ĉia socia kaj politika malegaleco.”**

Al la „libera ŝtato” mi revenos poste.

Do estontece la germana laboristpartio devas kredi je la „fera salajroleĝo” de Lasalo! Por ke ĝi ne perdiĝu, oni faras la sensencaĵon paroli pri „nuligo de la salajrosistemo” (deviis teksti: sistemo de dunglaboro) „*kun* la fera salajroleĝo”. Se mi nuligas la dunglaboron, tiam mi nature nuligas ankaŭ ĝiajn leĝojn, ĉu ferajn aŭ spongajn. Sed la batalo de Lasalo kontraŭ la dunglaboro temas preskaŭ nur pri tiu tielnomata leĝo. Do por pruvi ke la Lasala sekto venkis, la „salajrosistemo *kun* la fera salajroleĝo” estas nuligenda kaj ne sen tiu.

Kiel konate, el la „fera salajroleĝo” apartenas al Lasalo nenio ol la vorto „fera” pruntita el la „eternaj, feraj, grandaj leĝoj” de Goeto. La vorto *fera* estas signo per kiu rekonas sin la ĝustaj kredantoj. Sed se mi prenas la leĝon kun la stampo de Lasalo kaj pro tio en lia senco, tiam mi devas

---

25 La *Norddeutsche Allgemeine Zeitung* (Ĝenerala Gazeto de Norda Germanio), fondita en 1861, estis unue la la ĉefaj bismarkanaj gazetoj.

preni ĝin ankaŭ kun ĝia argumentado. Kaj kio estas ĝi? Kiel Lange<sup>26</sup> montris jam mallonge post la morto de Lasalo: la loĝantar-teorio<sup>27</sup> de Maltuso<sup>28</sup> (predikata de Lange mem). Sed se tiu estas ĝusta, tiam mi *ne* povas nuligi la leĝon, eĉ se mi centoble nuligas la salajrolaboron, ĉar la leĝo tiam regas ne nur la sistemon de la salajrolaboro, sed *ĉian* socian sistemon. Bazante sin ĝuste sur tiu, la ekonomikistoj pruvis de kvindek jaroj kaj pli longe ke la socialismo ne povas nuligi la *naturbazitan* mizeron, sed nur *ĝeneraligi* ĝin, samtempe dispartigi ĝin tra la tuta surfaco de la socio!

---

26 F.-A. LANGE: germana klerulo. Idealisma filozofo, aŭtoro de la reformisma libro esprimanta la vidpunkton de la radikala demokratio: *La laborista demando, ĝia signifo por la nuno kaj la estonto* (1865). Fama pro sia *Historio de la materiismo kaj kritiko de ĝia graveco en la nuntempo* (1866). [Franca eld.]

27 En siaj notoj pri la laborista salajro (1834) Markso disvolvas fortan kritikon de la maltusa teorio (vd Dungsalaĵro kaj kapitalo). En *La kapitalo* (vol. 3) Markso skribas pri la *Essay on the Principle of Population* de Maltuso (1798):

„... Tiu libro de Maltuso estas nur deklaro de lerneĵano pri tekstoj pruntitaj ĉe DeFoe, Franklin, Wallace, sir James Stewat, Townsend ktp. Estas tie nek esplorado nek ideo de la aŭtoro.” Kaj ankaŭ: „La variaĵoj de la ĝenerala salajrokvoto ne respondas ... al tiuj de la absoluta nombro de la loĝantaro; la diversa proporcio laŭ kiu la laborista klaso dividiĝas en aktiva kaj en rezerva armeo... jen kio determinas ekskluzive tiujn variaĵojn.” [Franca eld.]

28 Thomas MALTHUS (1766-1834): Angla ekonomikisto, aŭtoro de la fama *Eseo pri la principo de la loĝantaro* en kiu li deklaras ke la loĝantaro kreskas laŭ geometria progreso, dum la vivrimedoj povas kreski nur laŭ aritmetika progreso. Necesas do limigi la loĝantaron. Maltuso postulas por tio la *restriktan moralon*, do la rezignon pri geedziĝo por tiuj kiuj ne povas generi sane kaj certigi al siaj idoj relativan bonfarton. Markso montris la vantecon de tiu „leĝo” de Maltuso, pruvante ke „fakte ĉiu historia produktadmaniero havas siajn proprajn leĝojn de loĝantaro, historie validajn ene de siaj propraj limoj”. [Franca eld.]

Sed ĉio ĉi ne estas la ĉefa kaŭzo. *Tute sendepende* de la *malĝusta* formulado de la leĝo laŭ Lasalo, la vere abomeninda retropaŝo kuŝas en jeno:

Depost la morto de Lasalo la scienca kompreno trabatis al si la vojon en *nia* partio ke la *salajro* ne estas tio kio ĝi *ŝajnas* esti, nome la *valoro* respektive *prezo de la laboro*, sed nur maskita formo por la valoro respektive *prezo de la laborforto*. Per tio la tuta ĝisnuna burĝa kompreno de la salajro kiel la tuta ĝis nun kontraŭ tiu direktita kritiko estis unufoje por ĉiam renversita kaj klarigite ke la dunglaboristo havas nur la permeson labori por sia propra vivo, t.e. vivi, se li laboras certan tempon senpage por la kapitalisto (pro tio ankaŭ por ties kunkonsumantoj de la plusvaloro); ke la tuta kapitalisma produktadsistemo temas pri tio: plilongigi tiun senpagan laboron per etendado de la labortago aŭ per disvolvado de la produktivo, pli granda streĉado de la laborforto ktp; ke do la sistemo de la dunglaboro fariĝas sistemo de sklaveco, kaj nome de sklaveco kiu akriĝas sammezure kiel disvolviĝas la sociaj produktivfortoj de la laboro, sendepende de ĉu la laboristo ricevas pli bonan aŭ pli malbonan pagon. Kaj post kiam tiu kompreno ene de nia partio pli kaj pli trabatis al si la vojon, oni revenas al la dogmoj de Lasalo, kvankam oni nun devis scii ke Lasalo *ne sciis* kio estas la salajro, sed, sekvante la burĝajn ekonomikistojn, prenis la ŝajnon por la esenco de la afero. Estas kva-zaŭ inter sklavoj kiuj finfine malkovris la sekreton de la sklaveco kaj ekribelis, sklavo restinta en la arĥaiĝintaj ideoj skribus sur la ribelprogramon: La sklaveco estas nuligenda, ĉar la nutrado de la sklavoj en la sklavecsistemo ne povas superi certan maksimumon! La nura fakto ke la reprezentantoj de nia partio estis kapablaj fari tiom monstran atenc-on al la kompreno disvastiĝinta en la parti-amaso – ĉu tio ne pruvas sole, per kia <krima> facilanimeco, <per kia senkonscienco> ili agadis ĉe la redaktado de la kompromisa programo!

## II

Anstataŭ la malpreciza fina frazo de la paragrafo, „la nuligo de ĉia socia kaj politika malegaleco” necesis diri ke per la nuligo de la klasdiferencoj per si mem ĉiuj el ĝi fontanta socia kaj politika malegaleco malaperas.

## III

**„La germana laboristpartio postulas, por prepari la vojon al la solvo de la sociala demando, la starigon de produktadkooperativoj kun ŝtata helpo sub la demokratia kontrolado de la laboranta popolo. La produktadkooperativoj estas por industrio kaj terkulturado naskendaj en sama amplekso, ke el ili estiĝu la socialisma organiziĝo de la ĉiomlaboro.”**

Post la „fera salajroleĝo” de Lasalo la panaceo de la profeto! Oni digne „preparas la vojon”! Anstataŭ la ekzistanta klasbatalo venas senenhava parolturno de gazetskribistoj – „la sociala demando”, por kies „solvo” oni „preparas la vojon”. Anstataŭ el la revolucia transformadprocezo de la socio la „socialisma organiziĝo de la ĉiomlaboro” „estiĝas” el la „ŝtata helpo”, kiun la ŝtato donas al produktadkooperativoj kiujn ĝi, ne la laboristoj, „naskas”. Estas digna por la iluzio de Lasalo, ke oni povas per ŝtatpruntoj same bone konstrui novan socion kiel novan fervojon!

Pro <resto de> honto oni metas la „ŝtathelpon” – „sub la demokratian kontroladon de la laboranta popolo”.

Unue, „la laboranta popolo” konsistas en Germanio plimulte el terkulturistoj kaj ne el proletoj.

Due, „demokratia” signifas germane „popolrega”. Sed kion signifas „la popolrega kontrolado de la laboranta popo-

lo"? Kaj tio eĉ ĉe laborista popolo, kiu, per tiaj postuloj kiujn ĝi faras al la ŝtato, esprimas sian plenan konscion ke ĝi estas nek reganta nek matura por regado!

Ne necesas ĉi tie pritrakti la kritikon de la recepto<sup>29</sup> donitan de Buchez<sup>30</sup> sub Louis-Philippe en kontraŭdiro al la francaj socialistoj kaj akceptitan de la reakciaj laboristoj de la „Atelier”<sup>31</sup>. La ĉefa skandalo ankaŭ ne konsistas en tio ke oni skribis tiun specifan miraklo-kuracadon en la programon, sed ke oni entute, el vidpunkto de la klasa movado, malprogresas al sekta movado.

Ke la laboristoj volas starigi la kondiĉojn de kooperativa produktado je socia skalo kaj unue hejme, do je nacia skalo, tio signifas nur ke ili laboras por la renversado de la nunaj produktadkondiĉoj, kaj havas nenion komunan kun kreado de kooperativsocietoj kun ŝtata helpo! Sed se temas pri la nunaj kooperativsocietoj, tiuj havas valoron *nur* se ili estas sendependaj laboristaj kreaĵoj protektataj nek de la registaroj nek de la burĝoj.

---

29 Recepto de kooperativaj produktad-societoj kun helpo de la ŝtato. [Franca eld.]

30 Buchez, (1796-1865): Franca historiisto kaj politika verkisto. Proksimume inter 1840 kaj 1850 li estis la ĉefo de la franca katolika „socialismo”, la projekto de starigo de kooperativoj de produktistoj helpe de la ŝtato. [Franca eld.]

31 Unua franca laborista gazeto. Reakcia. Aperis de 1840 ĝis 1848.[Fr.eld.]

## IV

### IV

Mi venas nun al la demokratia alineo.

#### A. „Libereca bazo de la ŝtato.”

Unue, laŭ II, la germana laboristpartio alstrebas „la liberan ŝtaton”.

Libera ŝtato – kio estas tio?

Tute ne estas celo de la laboristoj, kiuj seniĝis je la limigita subulmenso, „liberigi” la ŝtaton. En la Germana Regno la „ŝtato” estas preskaŭ tiom „libera” kiom en Ruslando. La libereco konsistas en transformi la ŝtaton el organo superordigita al la socio al organo tute subordigita al ĝi, kaj ankaŭ nuntempe la ŝtatformoj estas pli aŭ malpli liberaj laŭ la mezuro en kiu ili limigas la „liberecon de la ŝtato”.

La germana laboristpartio – almenaŭ se ĝi adoptas la programon – montras, ke la socialismaj ideoj sidas ĉe ĝi eĉ ne haŭtprofunde; anstataŭ pritrakti la estantan socion (kaj tio validas por ĉia estonta socio) kiel la *bazon* de la estanta ŝtato (aŭ estontan por la estonta socio), oni pritraktas male la ŝtaton kiel sendependan realaĵon kiu posedas siajn proprajn *intelektajn, moralajn kaj liberajn bazojn*.

Kaj nun eĉ la horora misuzo kiun la programo faras per la vortoj „*nuna ŝtato*”, „*nuna socio*”, kaj la ankoraŭ pli horora miskompreno kiun ĝi faras pri la ŝtato, al kiu ĝi direktas siajn postulojn!

La „nuna socio” estas la kapitalisma socio kiu ekzistas en ĉiuj civilizitaj landoj, pli aŭ malpli libera de la mezepokaj elementoj, pli aŭ malpli modifita de la aparta historia evoluo de ĉiu lando, pli aŭ malpli evoluinta. La „nuna ŝtato”, male, ŝanĝiĝas kun la landlimo. Ĝi estas en la prusgermana imperio alia ol en Svislando, en Anglio alia ol en Usono. „*La*

nuna ŝtato” estas do fikcio.

Tamen, la diversaj ŝtatoj de la diversaj civilizitaj landoj, malgraŭ sia granda formdiverseco, havas ĉiuj komune ke ili staras sur la grundo de la moderna burĝa socio, nur de pli aŭ malpli kapitalisme evoluinta. Pro tio ili havas ankaŭ komune certajn esencajn ecojn. Tiusence eblas paroli pri „nuna ŝtateco”, kontraste al la estonteco, en kiu ĝia nuna radiko, la burĝa socio, estas mortinta.

Tiam leviĝas la demando: al kia transformado la ŝtato estos submetita en komunisma socio? Alivorte, kiaj sociaj funkcioj konserviĝos analoge al la nunaj ŝtatfunkcioj? Tiu demando respondeblas nur science; kaj oni eĉ ne milimetr-on proksimiĝas al la problemo per milfoja kunmeto de la vorto popolo kun la vorto ŝtato.

Inter la kapitalisma kaj la komunisma socio troviĝas la periodo de la revolucia transformado de la unua en la duan. Al ĝi kongruas ankaŭ politika transformperiodo, kies ŝtato povas esti nenio alia ol la *revolucia diktatoreco de la proletaro*.<sup>32</sup>

La programo siavice temas nek pri tiu ĉi, nek pri la estonta ŝtateco de la komunisma socio.

Ĝiaj politikaj postuloj entenas nenion krom la demokrat-an litanion bone konatan de ĉiuj: ĝeneralan voĉdonrajton, rektan leĝdonadon, popolarajton, popolmilicon ktp. Ili estas nura eĥo de la burĝa popolpartio<sup>33</sup>, de la Ligo de Paco kaj Libereco. Ili ĉiuj estas postuloj kiuj, se ili ne estas troigitaj en fantasta imago, estas jam *realigitaj*. Nur, la ŝtato al kiu

---

32 Jam en 1852, Markso skribas, en letero al Wiedemeyer, ke „*la klasbatalo kondukas nepre al la diktatoreco de la proletaro*”.

33 La Germana Popol-Partio aŭ Demokrata Partio, fondita en 1865, grupigis la etburĝaron de la malgrandaj kaj mezgrandaj ŝtatoj de Germanio. Ĝi kontraŭis la bismarkan politikon, postulante la starigon de Demokratia Respubliko. [Franca eld.]

#### IV

ili apartenas ne troviĝas ene de la germana imperia landlimo, sed en Svislando, Usono ktp. Tia „estonta ŝtato” estas *nuntempa ŝtato*, kvankam ekzistanta ekster „la kadro” de la Germana Regno.

Sed oni forgesis ion. Ĉar la germana laboristpartio eksplicite deklaras ke ĝi moviĝas ene „de la nuntempa nacia ŝtato”, do de sia ŝtato, de la prusgermana regno – ĝiaj postuloj estus alie ja grandparte sensencaj, ĉar oni postulas nur tion kion oni ankoraŭ ne havas – , ĝi ne devis forgesi la ĉefan aferon, nome ke ĉiuj tiuj belaj aferetoj implicas la agnoskon de tio kion oni nomas la suvereneco de la popolo, kaj ke ili trovas sian lokon do nur en *demokratia respubliko*.

Ĉar oni ne kuraĝas – kaj saĝe, ĉar la kondiĉoj postulas prudenton –, postuli la demokratian respublikon, kiel faris la francaj laboristprogramoj sub Louis-Philippe kaj sub Louis-Napoleon – tial oni ankaŭ ne devis fuĝi al la <nek „honestaj” nek inda> ruzaĵo postuli aferojn, kiuj havas sencanon nur en demokratia respubliko, postuli de ŝtato kiu estas nenio alia ol arme-despotismo police gardata, burokratece ĉarpentita, samtempe jam influata de la burĝaro, miksitaj kun feŭdaj elementoj kaj ornamita per parlamentaj formoj, <kaj krome solene aserti al tiu ŝtato ke oni iluzias trudi al ĝi tiajn aĵojn „per laŭleĝaj rimedoj”!>

Eĉ la vulgara demokratio, kiu vidas en la demokratia respubliko la Miljaran Regnon kaj tute ne imagas, ke ĝuste en tiu lasta ŝtatformo de burĝa socio batalendas definitive la klasbatalo – eĉ tiu staras ankoraŭ monte pli alte super tia demokrateco ene de la limoj de tio kio estas police permesata kaj logike malpermesata.

Ke oni efektive komprenas sub „ŝtato” la regadmaŝinon aŭ la ŝtaton kiel propran organismon, sekve al la labordivido, disigitan de la socio, tion montras jam tiuj ĉi vortoj: „La Germana Laborista Partio postulas kiel *ekonomian bazon de la ŝtato* unuecan kaj progresan imposton pri

Marĝenglosoj al la programo de la germana laboristpartio

enspezo, ktp.” La impostoj estas la ekonomia bazo de la registara maŝinaro kaj de nenio alia. En la estontoŝtato ekzistanta en Svislando tiuj postuloj estas sufiĉe plenumitaj. Imposto pri enspezoj antaŭkondiĉas la diversajn enspezfontojn de la diversaj sociaj klasoj, do la kapitalisman socion. Estas do neniel rimarkinde ke la Financial Reformers de Liverpulo – kun burĝoj kiel Glandstone<sup>34</sup> ĉe la pinto – faras la samajn postulojn kiel la programo.

## **B. „La germana laboristpartio postulas kiel intelektan kaj moralan bazon de la ŝtato:**

### ***1. Ĝeneralan kaj saman popoledukadon per la ŝtato. Ĝeneralan devigan lernejon, senpagan instruadon.”***

Ĉu saman popoledukadon? Kion oni imagas per tiuj vortoj? Ĉu oni kredas ke en la nuntempa socio (kaj temas nur pri tiu) la edukado povas esti *sama* por ĉiuj klasoj? Aŭ ĉu oni postulas ke ankaŭ la superaj klasoj estu devige reduktitaj al tiu speco de edukado – la popollernejo – kiu kongruas nur kun la ekonomiaj kondiĉoj ne nur de la dunglaboristoj, sed ankaŭ de la kamparanoj?

„Ĝeneralan devigan lernejon. Senpagan instruadon.” La unua ekzistas en Germanio, la dua en Svislando kaj Usono por popollernejoj. Se en kelkaj ŝtatoj de Usono ankaŭ „superaj” instru-institucioj estas „senpagaj”, tiam tio signifas fakte nur, pagi al la superaj klasoj ties edukadkostojn el la ĝenerala buĝeto. Preterpase dirite, la samo validas ankaŭ pri la „senpaga justec-administrado” postulata en la artikolo 5. La krimjusteco estas ĉie senpaga; la civila justeco funkcias ĉefe pri propriet-disputoj kaj koncernas do, pres-

---

34 Gladstone (1809-1898): Angla ŝtatisto, ĉefo de la liberala burĝaro. [Franca eld.]

#### IV

kaŭ nur, la posedantajn klasojn. Ĉu tiuj faru siajn procesojn surkoste de la publika buĝeto?

La paragrafo pri la lernejoj devintus almenaŭ postuli teĥnikajn lernejojn (teoriajn kaj praktikajn) lige kun la popollernejo.

Tute kondamninda estas „*popoledukado per la ŝtato*”. Difini per ĝenerala leĝo la rimedojn de la popollernejoj, la kvalifikadon de la instrupersonaro, la instrubranĉojn ktp, kaj, kiel okazas en Usono, prigardi, fare de ŝtataj inspektistoj, la plenumadon de tiuj leĝaj preskriboj, estas io tute alia ol nomumi la ŝtaton popoledukisto! Anstataŭ tio, registaro kaj eklezio estas same ekskludendaj el ĉia influo sur la lernejon. Multe pli, en la prusgermana regno (kaj oni ne uzu la eraran pretekston ke oni parolas pri „estonta ŝtato”; ni vidis kiel statas pri tiu) la ŝtato, inverse, bezonas tre krudan edukadon fare de la popolo.

Cetere la tuta programo, malgraŭ la demokratia tintado, estas de unu flanko ĝis la alia infektita de la subula kredo de la Lasala sekto je la ŝtato aŭ, kio estas ne pli bona, de la demokratia miraklokredo, aŭ pli ĝuste temas pri kompromiso inter tiuj du specoj de miraklokredo, ambaŭ same malproksimaj de socialismo.

„*Libereco de la scienco*” tekstas paragrafo de la prusa konstitucio. Do, kial ĉi tie?

„*Libereco de konscienco*”! Se oni volis, en tiu ĉi tempo de kulturbatalo<sup>35</sup>, memorigi al la liberalismo ĝiajn malnovajn sloganojn, oni povis fari tion nur en tiu ĉi formo: „ĉiu devas povi kontentigi sian religian kiel sian korpan neceson, sen ke la polico enŝovu sian nazon.” Sed la laborista

---

35 Post 1870, Bismarko, sub la nomo de *Kulturkampf* (kulturbatalo), faris ofensivon kontraŭ la germana katolika partio, la partio de la „Centro”, per policaj persekutoj. [Franca eld.]

Marĝenglosoj al la programo de la germana laboristpartio

partio devintus ĉe tiu okazo esprimi sian konvinkon ke la burĝa „libereco de konscienco” estas nenio alia ol la tolere-  
mo de ĉiaj eblaj specoj de *religia konscienc-libereco*, dum la  
partio klopodas por liberigi la konsciencojn el la religia fan-  
tasmagorio. Sed oni ŝatas ne transpaŝi la „burĝan” nivelon.

Mi venas nun al la fino, ĉar la aldonaĵo sekvanta nun en  
la programo ne konsistigas karakterizan parton. Do mi estu  
ĉi tie tre konciza.

## **2. Normalan labortagon.**

En neniuj aliaj landoj la laborista partio tenis sin je tiom  
malpreciza postulo, sed ĉiam indikis al la labortago la  
daŭron kiun ĝi konsideras normala, konsidere al la cirkon-  
stancoj.

## **3. Limigon de la laboro de virinoj kaj malpermeson de la laboro de infanoj.**

La reguligado de la labortago devas jam implici la limig-  
on de la laboro de virinoj, koncerne la daŭron, paŭzojn ktp  
de la labortago; alie ĝi povas signifi nur ekskludon de la  
virinlaboro el laborbranĉoj kiuj estas speciale malutilaj al la  
sano por la virina korpo aŭ kontraŭmoralaj por virinoj. Se  
oni celis tion, tiam oni devis diri ĝin.

„*Malpermeso de infanlaboro*”! Ĉi tie estis absolute nece-  
se indiki la *aĝlimon*.

*Ĝenerala malpermeso de infanlaboro* estas malkongrua  
kun la ekzisto de la granda industrio kaj pro tio naiva deziro  
sen atingopovo. Ĝia realigo – se ebla – estus reakcia, ĉar,  
kun strikta regulado de la labortempo laŭ la diversaj aĝŝtu-  
poj kaj kun aliaj antaŭmalhelpaj disponoj protekte al la  
infanoj, frutempa ligo de produktiva laboro kun instruado

estas unu el la plej potencaj rimedoj transformi la nuntemp-an socion.

#### ***4. Ŝtatan prigardon de la fabrik-, metiej- kaj hejm-industrio."***

Fronte al la prusgermana ŝtato necesis nerefuteble postuli ke la inspektistoj eksigebblas nur per tribunalo; ke ĉiu laboristo rajtas denunci ilin al la tribunaloj pro malobeo al iliaj devoj; ke ili devas aparteni al la kuracista metio.

#### ***5. Reguladon de la mallibereja laboro***

Etanima postulo en ĝenerala laboristprogramo. Ĉiukaze oni devis klare esprimi ke oni ne volas ke ili, pro konkurenco, estu traktataj kiel brutoj kaj ke oni ne intencas forpreni de ili tion kio estas ĝuste la sola rimedo plibonigi ilin, la produktivan laboron. Tio estis ja la minimumo kiun oni rajtis atendi de socialistoj.

#### ***6. Efikan malliberjan leĝon***

Estis dirende kion oni komprenas per „efika” mallibereja leĝo.

Ni rimarkigu preterpase, ke ĉe la normala labortago oni pretervidis la parton de la fabrikleĝaro kiu koncernas sanregularon kaj protektrimedojn kontraŭ danĝeroj ktp. La mallibereja leĝo efikas nur ekde kiam tiuj preskriboj estas malobeataj.

<Mallonge, ankaŭ tiu ĉi aldonajo karakteriziĝas per malzorga redaktado.>

Dixi et salvavi animam meam. [Mi parolis kaj savis mian animon].

## Monda Asembleo Socia (MAS) ...

... estas asocio fondita en la jaro 2005 de Esperantistoj kiuj, inspiritaj de la artikoloj de la gazeto (reta, laŭokaze papera) *Le Monde diplomatique en Esperanto* (<http://eo.mondediplo.com>) volas ne nur legi, sed ankaŭ diskuti kaj agi.

Ĝi estas strikte bazdemokratia, travidebla (por siaj membroj), progresema organizaĵo, kiu funkcias nur pere de retpoŝto kaj Interreto. Ĝi partoprenas en la Mondaj kaj laŭeble regionaj Forumoj kaj referencas en sia statuto por sia agado la tekstojn kunigitajn en la sekvapaĝe listigita libro „Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj ...”. Aliĝo kaj membreco estas senpagaj.

Ĝia retejo: <http://mas-eo.org> enhavas ĉiujn interesajn informojn pri MAS, kaj krome multajn legindajn artikolojn, tradukitajn aŭ memverkitajn de la membroj.

Ĉiu membro rajtas ne nur publikigi en la retpaĝo de MAS siajn tekstojn, sed ankaŭ publikigi librojn en la eldonejo de MAS, kondiĉe ke li havas aŭ trovas la rimedojn por presado – ĉar aliĝo kaj membreco estas senpagaj, MAS ĝenerale ne disponas pri la rimedoj pagi al verkemuloj la eldonadon de libroj.

Tamen, ĝis nun eldoniĝis jam pluraj libroj – jen laŭ la vico de ilia apero:

– **C. F. Ramuz: Aline** (novelo de la franclingva svisa aŭtoro en traduko de nia fama René de Saussure, reeldonita post la unua eldono en 1911), 2007

– **Arturo Ŝniclo: Rondo (Dek dialogoj); La fianĉino (Skizo), kun eseo pri verkoj de Ŝniclo de Hartmut Scheible**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2007

– **Karlo Markso: Salajro, prezo kaj profito** (prelego pri bazaj ekonomiaj fenomenoj antaŭ internaciaj delegitoj de la laborista movado), trad. de Vilhelmo Lutermano, 2007

– **Kubaj infanrakontoj**, trad. de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kun ilustraĵoj de Danny Daniel Pereyra, 2007

– **GBEGLO Koffi: Esperantujismo**, 2008

– **Johano Besada: Eseoj**, 2008

– **Karlo Markso: Nerefuteblaj citaĵoj**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2008

– **Fidel Castro Ruz: Dialogo de civilizacioj** (2 paroladoj), trad. de Amparado Cisnero, 2009

– **Dominique Vidal: Kiel Israelo elpelis la palestinanojn**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, Universala Deklaro de Homrajtoj, Konsilantaro pri Homrajtoj, Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, Internacia Traktatoj pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, Konvencio pri la Rajtoj de la Infano, Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj, Protokolo pri abolo de mortpuno, Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj** – trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Karlo Markso: Dunglaboro kaj kapitalo**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Karlo Markso: Pri liberkomerco, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009, 2-a eld. 2010

– **Eddy Raats: La longa vojaĝo. Travivaĵoj de etulo**, 2009

– **Dania Rodríguez García: Ni interŝanĝu; La nova leterportistino; Du kaj la fantazio**. Tri infanteatraĵoj. Elhispanigitaj de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kaj Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Karlo Markso: La mizero de la filozofio**, respondo al J.B. Prudono: „La filozofio de la mizero”; kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso; **Pri J. B. Prudono**. Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Jörg Goldberg k.a.: Ekonomia krizo – Analizoj n-ro 1**, Elgermanigoj de Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Salim Lamrani (komp.): La terorismo de Usono kontraŭ Kubo – La Kuba Kvinopo**, tradukoj de div. MAS-anoj, 2009

– **Elisée BYELONGO IŜELOKE: Eĥoj el Bembujo**. Tradicio, rilatoj kun Banyamulenge, la genezo de la milito en Kongolando-Kinŝaso, kaj la diasporo rilate al Esperanto, 2009

– **Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 2**, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, 2009

– **La homo kaj lia naturoLa bildo pri la homo en la kapitalisma socio kaj en marksismaj sciencoj**. Eseoj elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano,

2009

– **Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj unua ĝis naŭa**, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Frederiko Engelso: Pri la origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, 2010

– **Karlo Markso; Frederiko Engelso: Tezoj pri Fojerbaĥo, Principoj de komunismo kaj aliaj verketoj**, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, 2010

– **Werner Seppmann: Laboro kaj dialektiko – Pri la emancip-horizonto de la marksa pensado; Harald Neubert: La „historia misio de la laborista klaso” ĉe Markso kaj Engelso kaj la historia realeco; Hans Kölsch: Kubo – Heinz Dieterich – kontraŭe; Otto Meyer: Teologio de liberigo – ĉu etikedo-trompo aŭ paŝoj al emancipiĝo?**, eseoj elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, 2010

– **Arnold Petersen: Komentoj al la Komunista Manifesto**, tradukis el la angla kaj kompilis T. Veder, 2-a eldono, 2010

– **Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2-a eld., 2010 (tiu ĉi libro).

La libroj de MAS akireblas ĉe la kutimaj librovendejoj en Esperantujo, precipe ĉe tiuj de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de la Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Iliaj tekstoj estas libere elŝuteblaj por membroj de MAS.



Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo  
2-a eldono

Enpaĝigita de Monda Asembleo Socia (MAS)  
per OpenOffice 3.1.1,  
litertiparo DejaVu Serif 10pt)  
sub Mandriva Linukso 2010.0

Presita en Germanio en 2010

ISBN 978-2-918300-21-2